

La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-08

n-ro 349

Intertraktado de UN pri klimato en germana urbo Bonno



Germanio: manifestacio
en karbomino, tagon
antaŭ la COP23

Ekspozicio "Translation
matters" en EESK/KdR

La revolucio donis nefinan
venkon al Esperanto

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Intertraktado de UN pri klimato en germana urbo Bonno

23a Konferenco de Partioj Aliĝintaj al la Kadra Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝiĝo p. 03

Germanio: manifestacio en karbomino, tagon antaŭ la COP23

Laŭ UN, 80 ĝis 90% el la karborezervejoj ne devos esti ekspluatataj p. 04

Ozonterapio

En Eŭropo ĉirkaŭ 15 000 kuracistoj uzas tiun metodon nuntempe p. 05

Hodiaŭe

Bram STOKER; Gyula PEKÁR; István NEMERE; kaj Germanio p. 07

Ekspozicio "Translation matters" en EESK/KdR

"La lingvo de Eŭropo estas tradukado" p. 08

La revolucio donis nefinan venkon al Esperanto

Historio de aplikado de Esperanto en Rusio p. 10



Intertraktado de UN pri klimato en germana urbo Bonno

Lunde [06 nov 2017] en la germana urbo Bonno malfermiĝis la 23a Konferenco de Partioj Aliĝintaj al la Kadra Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝiĝo kun la alvoko sekvi la vojon de la Pariza Interkonsento pri Klimatsanĝiĝo.

La konferenco estas taskita pri redakto de la gvidlinio por la efektivigo de la Pariza Interkonsento, kiu estis konsentita de preskaŭ ĉiuj landoj en la mondo en 2015. La Pariza Interkonsento intencas trakti klimatsanĝiĝon per redukto de la eligado de forcejaj gasoj kaj starigi la tutmondan celon konservi la averaĝan temperaturon altiĝon ĝis ne pli ol du celsiaj gradoj super antaŭindustria nivelo.

En la malferma ceremonio de la konferenco, la plenuma sekretario de la

UN pri klimatsanĝiĝo, Patricia ESPINOSA, diris: "Kune kun la Tagordo pri Daŭripova Disvolvado, ni havas klaran vojon al vera traktado de klimatsanĝiĝo kaj daŭripova disvolvado."

ESPINOSA detalas la laboron, ke la registaroj serĉos solvojn en Bonno. La plej grava celo estas preni la sekvajn esencajn paŝojn por certigi, ke la funkciiga sistemo de la Pariza Interkonsento estos kompletigita en planita tempo, kaj ke la manieroj kaj rimedoj por efektivigo estos plifortigitaj.

Speciala reprezentanto de Ĉinio pri klimatsanĝiĝo XIE Zhenhua [解振华 Jiězhènhuá] diris en gazetara konferenco antaŭ la konferenco, ke Ĉinio esperas, ke la partoprenantoj atingos projekton de la gvidlinio, kiu reflektas la bezonojn de ĉiuj partioj kaj ĉiujn ĉefajn elementojn en la Pariza Interkonsento.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Germanio: manifestacio en karbomino, tagon antaŭ la COP23

Ĉirkaŭ 200 manifestaciantoj denunciis [tiel!] [mallaŭdis] dimanĉe [05 nov 2017] la efikon de la karbo kontraŭ la klimato, en mino proksime de Bonno, germana eksĉefurbo, kie malfermiĝas lunde la 23^a-n konferenco de UN pri la klimataj ŝanĝigoj.

Post longa marŝado tra senhoma areo, la protestantoj vestitaj per blanka kombineo stariĝis borde de giganta kratero formita de la subĉiela lignita mino [bebrunkarbo] de Hambach. Rigarde de policistoj, interalie starigitaj ĉirkaŭ skrapmaŝino pli ol 200 metrojn longe («la plej longaj el la mondo» substrekis la ekspluatantoj), la manifestaciantoj deplojadis siajn afiŝtabulojn «Bonvenon COP23» kaj «bruligu la landlimojn, ne la klimaton».

La karbo ellasas 45% el la tutmondaj emisioj de karbona dioksido, ligitaj al la energia sektoro

«La lignito estas unu el la plej poluaj fosiliaj energioj», kiuj damaĝas la aeron kaj klimaton, substrekas la germana kontraŭ-karba movado «Ende Gelände», kiu iniciatis tiun agadon, akompanata por la okazo de aktivuloj venintaj de Oceanio. «Sur la internacia scenejo, politikuloj kaj korporacioj prezentiĝas

kiel savontoj de la klimato, dum kelkajn kilometrojn apude, la klimato detruigās», diras Janna Aljets, proparolanto de la kampanjo.

Situanta kelkajn kilometrojn for de Bonno, en Nordrejn-Vestfalia, la lignutmino celita dimanĉon [03 nov 2017] apartenas al la germana grupo

RWE. Laŭ RWE, la mino, malfermita en 1978, estas hodiaŭ 370 metrojn

profunda: la areo je 85 kvadrataj kilometroj, el kiuj preskaŭ duono estas ekspluatata, entenas entute 2,5 miliardojn da lignito ĝis 450 metroj da profundo. Kvardek milionoj da

tunoj estas ekstraktataj de ĝi ĉiujare.

Laŭ la internacia agentejo pri energio (IEA), la karbo ellasas 45% el la tutmondaj emisioj de CO₂, ligitaj al la energia sektoro, al kiuj aldoniĝas aliaj forcejefikaj gasoj kaj partiklaj materialoj. La mondo neniam bruligis tiom da karbo de post la Industria revolucio. Dum la kresko de la tutmonda mendo atingis po 4% jare inter 2000 kaj 2013, ĝi ŝajne malkreskos en la periodo 2015-2021, laŭ la prognozoj de la IEA.

Tamen, laŭ UN, 80 ĝis 90% el la karborezervejoj ne devos esti ekspluatataj, se la mondo volas respekti sian celon fiksitan de la Pariza interkonsento: ke ĝi ne superos 2°C da varmiĝo.

Neniam Milito Inter Ni

Ozonterapio

Dum la lastaj jardekoj oni aŭdis kaj legis multe pri ozono, aparte pri la ozontavolo (aŭ ozona tavolo) kaj la ozontruo.

Kio estas ozono?

“Triatoma molekulo de oksigeno, O_3 , k[aj] gaso konsistanta el tiu molekulo” (PIV). “Ozono estas kemia kombinaĵo entenanta 3 oksigenoatomojn

(O_3). Ĉe kutimaj kondiĉoj Ozono emas malkomponiĝi al duoksigeno (O_2). Atmosfera ozono formiĝas pro ago (de la suna lumo) sur la oksigeno [...]” (E-Vikipedio)

Kio estas ozontavolo? “Stratosfera tavolo relative riĉa je ozono, kiu sorbas la kurt-ondajn ultraviolajn radiojn damaĝajn al la vivuloj” (PIV)

Kio estas ozontruo? “loka manko de ozono en la ozontavolo” (PIV)

Pliaj informoj legeblas en la E-Vikipedio:

“La ozona tavolo estas parto de la stratosfero, kiu entenas ozonon en grave pli granda kvanto [...] ol kompare en suba troposfero. Tiu fortigas la ultraviolan sunlumon danĝeran al la plejmulto de vivaĵoj.

Pro la liberigado de fluorklorkarbonhidrogenaĵoj (FKKH) dum la 1970-aj jaroj la ozona tavolo

komencis ekde tiam malkreski - precipe super la arkto kaj antarkto.”

Tamen – laŭ la titolo de ĉi-tiu artikolo mi ne volas paroli pri tiu temo, sed pri ozonterapio.



Ankaŭ tiu termino troviĝas en PIV, kiu donas la jenan eksplikon (aŭ difinon): “terapio per miksaĵo el oksigeno k[aj] ozono”.

La germanlingva vikipedia artikolo pri ozonterapio komenciĝas jene:

“Oni nomas ‘ozonterapio’ plurajn kontestatajn procedojn de la alternativa medicino, ĉe kiuj oni uzas la gason ozono (triatoma molekulo de oksigeno, O_3). La desinfekta, antisepa efiko de ozono estas konsiderata science pruvita, sed pri specifaj kurac-efikoj mankas science kontroleblaj pruvoj.”

En la retejo de la Brazila Asocio pri Ozonterapio legeblas la ĉi-suba difino de la metodo:

“La ozonterapio estas tekniko kiu uzas la diversmanieran aplikadon de miksaĵo de la gasoj oksigeno kaj ozono por kuracaj celoj. La medicina ozono ĉiam estas miksaĵo de ozono kaj oksigeno.”

Pri la historio troviĝas en la menciita retejo la sekvaj informoj:

“La gaso ozono estis malkovrita en 1840 de la germana esploristo Dr-o Christian

Friedrich SCHOENBEIN, kiu perceptis apartan odoron, kiam oksigeno estis submetita al elektra malŝarĝo; ĉar tio okazis ĉiam, li nomis la gason “ozein”, kiu en la greka signifas “tio, kio odoras”. En 1857 la fizikisto Dr-o Werner VON SIEMENS disvolvis la Generatoron de Altfrekvenco, kiu estigas ozonon pere de elektraj malŝarĝoj en oksigenaj atomoj.

La kuraca ozonterapio estas uzata ekde la 19-a jarcento. La unuaj studoj estis faritaj en Germanio. Komence la terapio estis uzata por lukti kontraŭ la agado de bakterioj sur la homa haŭto. Dum la 1-a Mondmilito (1914-1918) germanaj kaj anglaj kuracistoj uzis ozonon por trakti vundojn de soldatoj.”

Vidu kelkajn informojn pri la uzo de la ozonterapio en la mondo (ankoraŭ laŭ la menciita retpaĝaro):

“Nuntempe la Ozonterapio estas agnoskita de la sansistemoj de Germanio, Svisio, Aŭstrio, Italio, Kubo, Ukrainio, Rusio, Grekio, Izraelo, Egiptio kaj Aŭstralio, kaj ĝi estas uzata en 13 subŝtatoj de Usono [...]. En la plejmulto de tiuj landoj la san-asekuro pagas la ozonoterapiajn traktadojn. [...]

En Eŭropo ĉirkaŭ 15 000 kuracistoj uzas tiun metodon nuntempe. En Germanio ĉiujare estas farataj 7 milionoj da tiaj terapioj. En la 1980-aj jaroj la Germana Kuraca Societo pri Ozonterapio mendis studon por taksu la sendanĝerecon de la ozonterapio. En la esploro partoprenis 344 kuracistoj (praktikantoj de la terapio) kaj 384.775 malsanuloj, kaj estis farataj 5.579.238 traktadoj. Nur en 40 okazoj oni perceptis malgravajn kromefikojn, tiel ke la ozonterapio estas ekde tiam

konsiderata unu el la plej sekuraj kuracmetodoj.”

Laŭ la Brazila Asocio pri Ozonterapio la medicina ozono povas esti uzata i.a. en la traktado de:

- Problemoj de sangocirkulado
- Kelkaj malsanoj kaj kondiĉoj de maljunuloj
- Malsanoj kaŭzitaj de virusoj, ekzemple hepatito, herpeto kaj zoster
- Infektitaj aŭ inflamitaj vundoj kiuj malfacile cikatriĝas; ekzemple [diverstipaj] ulceroj ĉe la kruroj [...], risko de gangreno
- Kojlitoj kaj aliaj kronikaj intestaj inflamoj
- Brulvundoj
- Herniaj, lumbalgio
- Artikaj doloroj kaŭzitaj de kronikaj inflamaj malsanoj

En Brazilo la terapio ankoraŭ ne estas oficiale agnoskita, sed ĝi estas nun diskutata de Komitato pri Sociaj Aferoj de la Senato. En 2015 la Federacia Konsilio pri Dentkuraca Medicino regularigis ĝin, kaj ekde tiam la dentistoj rajtas uzi ĝin dum kelkaj procedoj: eltiro de dentoj, traktado de la dentradika dukto, traktado de gingivito.

Herbert A. WELKER
Esperanta Retradio



Bram STOKER

Abraham STOKER (normale mallongita kiel Bram STOKER, naskiĝis la 8-an de novembro 1847 apud Dublino, mortis la 20-an de aprilo 1912 en Londono) estis Irlanda verkisto, i.a. fama pro la rakonto *Drakulo*, la ĉefa verko pri la vampirmito.

Vikipedio

Gyula PEKÁR

Gyula PEKÁR [djula pekAr], hungare Pekár Gyula, Esperante Julio Pekár estis hungara verkisto, ĵurnalisto, politikisto.

En Esperanto aperis: *Pierrot kaj Colombine*.

Vikipedio



István NEMERE

István NEMERE [IŜTvan NEMere] (laŭ la hungara skribmaniero Nemere István; iam li uzadis Stefano Nemere) (naskiĝis la 8-an de novembro 1944 en Pécs) estas hungara verkisto kaj tradukisto. Esperantistiĝis en 1962. Nemere verkas ĉefe en la hungara lingvo, sed ankaŭ - tre aktive - en Esperanto. Li gajnis trifoje la premion "La Verko de la Jaro" kaj prezidis la Esperantan PEN-Centron.

En Esperanto aperis pluraj verkoj.

Vikipedio



Bildo de la tago

Ĉambro de birdoj en la Muzeo de Natura Historio en *Bamberg*, Germanio.

Vikipedio

Ekspozicio "*Translation matters*" en EESK/KdR

"*La lingvo de Eŭropo estas tradukado*" – Umberto Eco

Okaze de la Internacia Tago de Tradukado proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (sabato la 30a de septembro, mortotago de Sankta Hieronimo kiu estas patrono de tradukistoj), la 29an de septembro 2017 malfermiĝis en "la Trèves-

konstruaĵo", unu el la komunaj konstruaĵoj de Eŭropa Ekonomia kaj Socia Komitato (EESK) kaj Komitato de la Regionoj (KdR) en Bruselo, ekspozicio pri tradukado "*Translation matters*" (vortlunde "Aferoj pri-tradukaj / Tradukado gravas"). La ekspozicio kunigis tridekon da kontribuoj de getradukistoj el la sama komuna tradukservo de EESK/KdR (inter ili ankaŭ de Esperantistino), kiuj depost tiu-ĉi jaro ĉiuj troviĝas en tiu sama kaj la tuj najbara konstruaĵo, sub la gvido de kroata tradukunuestrino Suzanna Matvejevic. Por la malfermo, getradukistoj el la diversaj tradukunuoj laŭtleĝis eron el la Ŝekspira komedio "Somermeznokta Sonĝo", ĉiu en sia lingvo, antaŭ komuna tagmanĝo kun

manĝaĵoj el la diversaj EU-landoj.

La ekspozicion vizitis ne nur la getradukistoj de la du Komitatoj, sed interalie ankaŭ la du ĝeneralaj sekretarioj kaj la du prezidantoj de kaj EESK kaj KdR, kaj du membroj de la apuda Eŭropa Parlamento. Dum la du vizitoj kiujn mi

mem ĉeestis, montriĝis ke Jiří BURIÁNEK, la ĝenerala sekretario de KdR, kaj Karl-Heinz LAMBERTZ, la novelektita prezidanto de KdR, ambaŭ mem iam laboris kiel tradukistoj, do ili

proprasperte komprenis la malfacilojn de tradukado kaj tre interesiĝis pri ties diversaj aspektoj montritaj en la ekspozicio. Je la tablo pri Esperanto, s-ro BURIÁNEK interesiĝis interalie pri la rilato inter Esperanto kaj la paco-movado, dum s-ro LAMBERTZ – kiu venas el germanlingva orienta Belgio – demandis pri la teritorio de Neŭtrala Moresnet. La ĝenerala sekretario de EESK, Luis Planas PUCHADES, siavice iam estis diplomato kaj estis tre bone edukita pri multaj de la ekspozicieroj.

La kontribuoj en la ekspozicio kovris vastan aron da tradukado-rilataj temoj: ĝi komencis per la fama "Regulamento numero 1" de Eŭropa Unio pri ties laborlingvoj kaj tradukado en EU tiam



kaj nuntempe, kun video kreita tiucele, kaj ankaŭ specife pri la tradukservo de EESK/KdR; poste sekvis rigardo tra la traduk-historio ekde Antikva Egiptio (kun interalie la fama Rozeta ŝtono), tra mezepoko kun diverslingvaj tradukoj de la Sankta Biblio (kun ekskursoj pri cenzuro de libroj kaj tradukoj, kaj pri germanigo de la Biblio fare de Martin LUTHER); pri la rolo de kaj labormanieroj en la Tradukskolo de Toledo en Hispanio; pri Esperanto kaj la rolo de tradukado en ties kreiĝo (aldona ero pri la rolo de Esperanto en terminologio bedaŭrinde estis fortranĉita pro spacomanko, sed ĝi ja menciigis en la akompana faldfolio kaj en pluraj ekspoziciitaj libroj priaj); pri interesaj retaj artikoloj pri la rolo de tradukado en i.a. NROoj por helpi homojn post katastrofoj, aŭ de John LE CARRÉ por kompreni alilingvajn rigardojn al la mondo; pri la diferencoj inter tradukado kaj interpretado (unu estas skriba, la alia parola – tial iuj nomas ĝin "buŝtradukado" en Esperanto – kaj el tio rezultas aro da diferencoj pri necesaj kapabloj kaj labormanieroj); pri famaj getradukistoj el ĉiuj EU-membroŝtatoj; pri amuzaj mistradukoj; kaj pri elrigardo al la estonteco, kun eblaj estontaj evoluoj pri nuna kaj planata aŭtomata tradukado kaj kun la rolo de lingvoj kaj tradukado en sciencfikcio. Al la grandaj fenestroj estis afiŝitaj citoj mezlongaj kaj longaj pri lingvoj kaj tradukado (mallongaj citoj krome disponeblis kiel paĝmarkiloj, parto da ili venis de lingvo.info). Fine vizitantoj povis afiŝi en granda tabulo kial por ili

tradukado gravas, kaj/aŭ kontribui pliajn amuzajn mistradukojn. Entute estis larĝa gamo da tradukrilataj temoj – malgraŭ manko de propra buĝeto kaj de pli vasta varbado –, danke al la entuziasma kunlaboro de la kontribuintaj getradukistoj.

La ekspozicio finiĝis la 20an de oktobro je tuttaga Malferma Tago de la komuna tradukservo de EESK/KdR, kiu inkluzivis enkondukon al la traduka laboro de la du Komitatoj kaj la vojo de dokumentoj trans tradukado ("kien iras mia dokumento?" por la ne-tradukaj unuoj de la Komitatoj), rondgvidadon tra la traduk-administra unuo (kiu distribuas la tradukotajn dokumentojn al la bezonataj tradukunuoj, faras antaŭkontrolon de la originalo kaj donas limdatojn) kaj la franca tradukunuo, viziton al la ekspozicio kaj kelkajn ludojn kaj kvizojn. Je la enirejo oni montris surbendigon de la multlingva laŭtleĝado de Ŝekspiro el la malferma aranĝo. Krom la novelektita Prezidanto de KdR venis al tiu konkluda Malferma Tago ankaŭ ses grupoj da vizitantoj, kiuj ĉiuj ricevis rondgvidadojn. Ankoraŭ ne eblas diri kun certeco, sed estas ebleco ke venontjare por la sekva Internacia Tago de Tradukado oni denove organizos ion similan.

Sandra SCHWEDER

Tradukasistentino en la germana tradukunuo de EESK/KdR, kaj unu el momente tri geesperantistoj en la Komitatoj
Eŭropa Bulteno, n-ro 174

La revolucio donis nefinan venkon al Esperanto

Antaŭ cent jaroj, la 7-an de novembro 1917 laŭ la moderna kalendaro, en Rusio okazis revolucio kiu ŝanĝis la mondon. En Rusio la revolucio renversis ĉion kaj inter multaj aliaj evoluoj dum kelkaj jaroj enkondukis oran epokon de Esperanto.

Antaŭ kelkaj jaroj Dmitrij VLASOV, kiu tiam studis ĵurnalistikon en la Peterburga Universitato en Rusio, ekinteresiĝis pri Esperanto. La rezulto de lia interesiĝo iĝis du monografioj pri la uzo de Esperanto en Rusio de 1887 ĝis 1938, kiam la Esperanto-movado efektive estis likvidita de la sovetiaj potenculoj.

En sia magistriĝa disertaĵo Historio de aplikado de Esperanto en Rusio, aperinta ruslingve ĉe la eldonejo Impeto en 2014, Dmitrij VLASOV interese rakontas pri la estiĝo, ekfloro kaj malapero de la Esperanta gazetaro en Rusio antaŭ cent jaroj. La saman temon li esploras ankaŭ en sia pli frua verko Esperanto – duonjarcento sub la cenzuro, aperinta ruslingve ĉe Impeto en 2011.

Ni petis lin rakonti pri siaj esplorrezultoj en mallonga intervjuo.

Libera Folio: *Kiaj estis la kondiĉoj de la Esperanta gazetaro en Rusio en la jaroj antaŭ la februara revolucio en 1917? Kio ŝanĝiĝis lige kun la februara revolucio, kaj kiuj estis la plej signifaj Esperantaj eldonaĵoj de tiu tempo?*

Dmitrij VLASOV: – Esperanta gazetaro en la Rusia imperio estiĝis en la jaro 1905. Antaŭ la

Februara Revolucio en la lando aperis proksimume 40 esperantistaj eldonaĵoj. Tipologie oni povas dividi ilin en tri grupojn. Unue, eldonaĵoj en Esperanto kaj en naciaj lingvoj (la rusa, pola, armena, finna kaj sveda) pri la Esperanto-movado. Due, ruslingvaj, katalogecaj eldonaĵoj pri la sukcesoj en la disvastigo de Esperanto. Trie, fakaj eldonaĵoj en la internacia lingvo.



– Plej interesaj kompreneble estas la eldonaĵoj de la lasta grupo, ĉar en ili la internacia lingvo estis uzata por transdoni informojn, kiuj ne estis

ligitaj kun la Esperanto-movado. Al la plej signifaj el tiuj indas kalkuli la popularsciencan gazeton Espero de la konata Peterburga eldonisto V. Bitner kaj du Varsoviajn eldonaĵojn por medicinistoj: Kuracisto kaj Voĉo de Farmaciistoj.

– Inter la eldonaĵoj dediĉitaj al la Esperanto-movado aperis du grandaj gazetoj: la Peterburga Ruslanda Esperantisto kaj la Moskva La Ondo de Esperanto.

– La februara revolucio fakte neniel influis la Esperantan gazetaron.

Sufiĉe baldaŭ post la oktobra puĉo en 1917 la bolŝevistoj fermis ĉiujn opoziciajn kaj sendependajn gazetojn. Ĉu tio signifis, ke estis fermitaj ankaŭ la eldonaĵoj de la esperantistoj? Kion oni povis presi en Esperanto post oktobro 1917? Kiajn malfacilaĵojn renkontis la eldonistoj de tiu tempo?

– Oni devas memori, ke la Oktobra revolucio okazis dum la unua mondmilito, en periodo, kiam la rusia Esperanto-movado estis tre

malfortigita. Unue, multaj esperantistoj estis vokitaj al la fronto kaj pereis. Due, la ekonomiaj problemoj de Rusio forte tuŝis ankaŭ la Esperanto-movadon.

– Se paroli pri la Esperanta gazetaro, do dum la milito pro la alta prezo de papero multaj eldonistoj devis rezigni pri eldonado de periodaĵoj. Tiel en oktobro 1917 en la lando jam ne restis eldonaĵoj en la internacia lingvo. Tamen en la jaro 1918 neatendite okazis subita vigliĝo de la Esperanta gazetaro.

– De 1918 ĝis 1922 en la lando aperis proksimume 50 eldonaĵoj de esperantistoj – efektive pli ol dum la cara tempo! Tamen preskaŭ ĉiuj ili fermiĝis post la publikigo de la unua aŭ dua numero – pro pure ekonomiaj kialoj. Rimarkindas, ke parto el ili estis finance subtenataj de la soveta registaro. Ĉiu ĉi tiuj periodaĵoj estis dediĉitaj al la revoj pri la brila estonteco de Esperanto en la soveta Rusio.

En la 1920-aj jaroj Esperanto estis vaste uzata en Sovetio kadre de la tiel nomata proleta Esperanto-korespondado. Pri kia korespondado temis, kaj kiel ĝi estis uzata en la soveta gazetaro kaj radio?

– En la 1920-aj jaroj en Sovetio forte evoluis la socia movado de laboristaj-kampanaj korespondantoj. La esenca celo de la movado estis altiri al la gazetaro laboristojn kaj kampanojn, kiuj verku artikolojn kaj noticojn por amasaj eldonaĵoj. Vaste evoluis en ĉi tiu periodo ankaŭ internacia korespondado: en sovetaj eldonaĵoj estis presitaj leteroj de eksterlandaj laboristoj kaj kampanoj, dum en eksterlandaj komunismaj eldonaĵoj estis presitaj leteroj el Sovetio.

– Esperantistoj tuj ekatentis pri ĉi tiu nova fenomeno, kaj rapide aliĝis al la laboro. Tiel Esperanto iĝis unu el la ĉefaj lingvoj de la internacia laborista-kampana kontakto.

Aldone, ekde 1922 multaj sovetaj radiostacioj komencis elsendi propagandajn programojn en la internacia lingvo pri la vivo en Sovetio por eksterlandaj aŭskultantoj. Lige kun tio, la 1920-ajn jarojn oni povas nomi "ora epoko" de Esperanto, ĉar tiam oni tre aktive uzis ĝin en la praktiko.

Kial kaj kiel finiĝis la periodo de la proleta Esperanto-korespondado? Kiam ĉesis aperi artikoloj en kaj pri Esperanto en Sovetio, kaj kio okazis al la esperantistoj?

– Fine de la 1920-aj jaroj la bolŝevistojn ekmaltrankviligis la kresko de la movado de la laboristaj-kampanaj korespondantoj, kiu tiam ekhavis enorman skalon. La komunisma partio timis, ke la socia movado povus evolui en la direkto de politika partio, kiu iĝus opozicia.

– Tial oni faris ĉion por ne permesi tian disvolviĝon. Oni komencis subpremi socian aktivadon. Tio kompreneble tuŝis ankaŭ la soveta Esperanto-movadon, kiu en la 1930-aj jaroj estis tre proksime ligita kun la movado de la laboristaj-kampanaj korespondantoj. La sovetaj esperantistoj komencis perdi la subtenon de la potenculoj.

– Aldone en la 1930-aj jaroj en Eŭropo estiĝis la minaco de milito. Tio siavice kaŭzis ke Sovetio fermis sin de aliaj landoj, kio signifis la finon de internaciaj laboristaj-kampanaj ligoj, ankaŭ en Esperanto. Por liberiĝi de la esperantistaj korespondantoj, la potenculoj likvidis la tutan Sovetian Esperanto-movadon. En la jaroj 1936–1938 ĝiaj gvidantoj estis akuzitaj pri spionado kaj kontraŭrevolucia agado, kaj poste reprezaliitaj [tiel!] [persekutitaj (iuj mortigitaj)].

Libera Folio